

Johann Wolfgang von Goethe,  
 Noktokanto de migranto  
*tradukita de Manfred Retzlaff*

Vi, venanto de l' chielo,  
 Foriganto la doloron,  
 Freshiganta per mielo  
 De l' sufereganto koron,  
 - Min plenumas ega laco!  
 Kial tiu ghoj' kaj ve'? -  
 Dolcha paco,  
 Venu, mi sopiras tre!

*Traduko de la Germana poemo “Wanderers Nachtlied” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1983-06-17.*

MR-063-2 / Arg-738-1491 (2012-12-29 13:38:37)

Johann Wolfgang von Goethe,  
 Noktolido de migranto  
*tradukita de Richard Schulz*

Vi, sendito de l' chiel',  
 Foriganto de doloro,  
 Antau kies brila hel'  
 Forsekighas chiuj ploroj,  
 - Ve pro la adado laco,  
 Kia de la faroj fin'? -  
 Dolcha paco,  
 Nestu do en mia sin'!

*Traduko de la Germana poemo “Wanderers Nachtlied” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26).*

Arg-738-1490 (2013-02-26 15:13:51)

*Tiu poem-esperantigo trovighis sur la pagho 136 de la “Vestfaliaj Flugfolioj” eldonitaj de Richard Schulz (Rikardo Ŝulco). Pri Richard Schulz vidu la vikipediaan retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*